# *Centoj da meksikanoj protestas fronte al la usona ambasadejo*




Meksikurbo, 6 a?g (RHK) Centoj da meksikanoj koncentri?is fronte al la usona ambasadejo por denunci kaj komdamni la teroristan agreson de blankula superem-rasisto, kiu mortigis 22 personojn kaj vundis aliajn 24  en El Paso, Texas.

Membroj de movadoj favore de la elmigrantoj esprimis fronte al la ambasadejo  kaj denuncis ke tiu masakro estis krimo de malamo kaj ksenofobio de fanatikulo inspirita en diskriminacia parolado de Donald Trump.

Estis terorista atenco kontra? la latina komunumo, kaj en tiu kadro, ili  akuzis la usonan prezidenton esti la respondeculo de tiu krimo kaj alia de Ohio, kie mortis 9 personoj kaj alia en Chicago kie estis sep vunditoj.

Membroj de la du-nacia movado por espero, la du-nacia koalicio kontra? Donald Trump kaj la koalicio du-nacia Migranto Aztlán alvokis la meksikanojn forlasi  sian apation kaj forte postuli kontra? la oficiala usona politiko kontra? Meksiko kaj ties civitanojn.

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/internacionales/198194-centoj-da-meksikanoj-protestas-fronte-al-la-usona-ambasadejo

# Radio Habana Cuba